

N°182
avril
mai
juin
2018

LA INFORMILO

N° 182
aprilo
majo
junio
2018

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2018
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€



De jeunes espérantophones à l'origine des rencontres de polyglottes

Chaque année quelques centaines de jeunes passionnés par les langues se retrouvent dans un coin du monde – Berlin en 2017 – Bratislava en 2018 – pour apprendre ensemble de nouvelles langues. En général ils en parlent déjà quelques-unes, mais les multiples rencontres et l'émulation qui naît lors de telles rencontres augmentent considérablement le désir de communiquer, que ce soit par simple plaisir ou pour pratiquer les langues dans le milieu professionnel.

L'espéranto fait partie des langues de ces rencontres et il faut également souligner que ce sont de jeunes espérantophones qui les organisent. Une preuve de plus que l'espéranto favorise l'ouverture vers les autres langues et cultures.

Quelle merveilleuse occasion pour ces jeunes de se rencontrer et de découvrir ensemble les charmes de la ville de congrès et de ses environs.

Soyez curieux! Consultez le site:

Polyglot Gathering 2018 in Bratislava

<https://www.polyglotbratislava.com/>

83a Regiona Staĝo de Esperanto


 France-Est

 organizita de **MULHOUSE**  **ESPERANTO**

 En la ferio-centro de
 la 20/21/22-ajn de aprilo 2018 en Buhl
 apud Guebwiller


Nia regiona staĝo havis belan sukceson ĉe la montoflanko de Rimlishof, al tio helpis la printempa vetero kaj la simpatia etoso inter la partoprenantoj. La prelego de Spomenka Ŝtimec kaj la koncerto de Anjo Amiko kaptis la atenton de la ĉeestantoj. Roberto sukcesis krei agrablan kvazaŭ magian etoson ĉe la dimanĉa plenaera aperitivo, dank'al alzaca ŝaŭm-vino kaj kugelhupfo de Violette. Ni ĉiuj estis kvazaŭ feriantaj.

Jen ankaŭ raportoj kaj raporteto de kelkaj partoprenantoj.
 Andreo

Iom laca post la veturado ĝis Buhl, ĉefe la traĭro de Thann estis streĉa, mi alvenis la staĝejon ĉirkaŭ la 9-a. Andreo bonvenigis min kaj tuj poste mi partoprenis en la vizito al la abatejo de Murbach. Tie Edmond klarigis pri la historio de la loko kaj ni ĝuis la etoson. Dum tiu momento, leviĝis tre pura, tre klara voĉo en la ĥorejo.

Kia emocio! Anjo kantis kortuŝante nin!

Mi forgesis la lacigan vojon, de nove mi havis energion. . . Ĉiuj, ni estis ĉarmataj.

La kunveno bele komenciĝis.

Liliane Bersweiler



La grupo estis tre diversa, duone franca, duone fremlanda, tio taŭgis ĉar maloportunis krokodilado.

Mi renkontis homojn, kiujn mi ne vidis de longe, kaj homojn, kiujn mi neniam vidis, eĉ

homojn, kiuj loĝas proksime sed kutime neglektas veni en niajn aranĝojn. Ĉu la bela vetero efikis? Ĉu la ĉeesto de niaj du stelulinoj Spomenka kaj Anjo? Ĉu la fakto ke ni aŭkcie vendis interesajn librojn, kiuj estis heredaĵo de ĵus mortinta esperantisto?

Mi apartigas anekdoton:

En la sama manĝejo, kaj en la sama distrokonstruaĵo, sube, ni renkontis grupon de adoleskantoj, kiuj estis tre ĝojaj kaj tre viglaj. Ili estis tie por

trejnado de teatro kaj kantoj, kun la celo viziti poste vilaĝojn kaj fari spektakletojn. La animantoj estis tre afablaj. Kun Dieter Rooke, mi estis hazarde en la salono, en kiu ili trejnadis por kantoj. Ni petis permeson aŭskulti iomete. Nigra knabineto venis al ni kaj esprimis deziron intervjui nin per sia poŝtelefono. Mi diris, montrante Dieteron: "Li estas germana, mi estas franca, kaj kune ni parolas en esperanto". Poste mi tradukis france, kaj

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (Kroatio)

**Memorige al
 Roger IMBERT (1938-2009)**



ŝi estis tre kontenta, ŝi havis unikaĵon sur sia poŝtelefono.

Sed ne nur mi havis kontaktojn kun tiu grupo, kaj ni ĉiuj bedaŭris, ke tiuj simpatiaj junuloj ne estas esperantistoj.

Mi aĉetis tre bonan libron "Home en senhomeco". Dum la sekva semajno, mi avida legis ĝin, tiu libro pasiĝis min, dume ĉiuj ceteraj devoj estis forlasitaj. Alia punkto:

Kial nia federacio invitis Spomenkan?

Okazis, ke grava franca esperantisto, Roger Imbert, kiu naskiĝis en Migennes, ne tro malproksima de nia regiono, edziĝis en la aĝo 22, kun la kroatino Nevenka, kiun li renkontis dum studoj en

Parizo; li translokiĝis al Zagreb kaj tie li mortis en 2009.

Li estis tre dinamika kaj donis grandan elanon al la Zagreba grupo.

La kvaropo Roger Imbert, Ivica



Spoliarec, Zlatko Tišlar kaj Spomenka Štimec kreis la zagreban metodon. Poste Tibor Sekelj anstataŭis Ivica Spoliarec kaj ankaŭ donis elanon al la grupo.

Edmond Ludwig ĵus verkis omaĝan libreton pri Roger Imbert, kiun li vendis dum la renkonto, pro tio Spomenka ne povis rifuzi veni.



Ŝi rakontis multe da anekdotoj pri Roger Imbert, eĉ kelkajn, kiuj ne estas en la libreto.

Pri siaj propraj libroj, ŝi ne rakontis pri la enhavo, sed pri la cirkonstancoj, kiuj puŝis ŝin al verkado, pri la sekvoj de la aperoj de la libroj, kaj ĝenerale pri la problemoj/eventoj spertitaj antaŭ kaj post la apero de la libroj. Pro tio, la personoj, kiuj jam legis ŝiajn librojn, tute ne enuis kaj eksciis novajn faktojn, ofte amuzajn.

Ginette MARTIN



De la 20-a ĝis 22-a de aprilo 2018 kolektiĝis 40 verduloj en feriejo Rimlishof, en orienta Francio.

La belega vetero favoris nin per bluega ĉielo kaj varmo somera. Loka Esperantisto, S-ro Edmond Ludwig gvidis nin al vidindaĵoj en proksima urbeto Guebwiller.

En ĝi troviĝas muzeo kun nomo: Théodoro Deck, kiu mem inventis bluan ceramikaĵon.

En vitrinoj staris belegaj ĉielbluaj florvazoj, unu salono montris kahelan banĉambron kun surpentritaj birdoj.

Unu etaĝo estis dediĉita al la unua kaj dua mondmilitoj; ambaŭ furiozis en la ĉelima regiono Alzaco.

En ĉefa preĝejo videblis portreto de misiisto Andreas Bauer, pereinta en jaro 1900 en Ĉinio, kiel martiro dum la boksista insurekcio. Plej elstare kontribuis al la programo la eminentaj stelulinoj el Esperantio Anjo Amika el Hungario,





Aŭkcia vendado

Fotis Gerold Busch

kaj Spomenka Ŝtimec el Kroatio.

La vendredan vesperon Anjo kantigis nin per *La lingvo por ni*, *La fluanta tajdo*, kaj *Apudmoskvaj vesperoj*.

Postan vesperon ŝi sole prezentis sian vaste konatan repertuaron. En preĝejo ni aŭdis la "Ave Maria" en latina lingvo. S-ino Spomenka Ŝtimec intereskapte rakontis pri sia verkaro, la *Kroata milita noktlibro*; jam tradukita al kelkaj naciaj lingvoj. Ŝi krome parolis pri la Esperanto-monumento starigita en Zagrebo okaze de la UK; ĉiujn obstaklojn kaj malhelpojn ŝi venkis persiste kaj optimisme. La vivon de Ferdinand Hodler ŝi esploris, ĉar li estis edzo de kroatino. Multaj el liaj pentraĵoj konserviĝis en muzeo de Sarajevo; i.a. portreto de juna Hektor Hodler, fondinto de UEA.

La ĉeforganizanto de la renkontiĝo, S-ro Andreo Grossmann programis aŭkcion de



Spomenka Ŝtimec

malnovaj Esperanto-libroj.

La unua aŭkciaĵo tamen estis dupaĝa anonco el ĵurnalo "Le monde" reklamo por Esperanto, mendita de japano S-ano Etsuo Mijoŝi.

En la granda libroservo estis aĉeteblaj pli novaj libroj; la plej freŝa estis la tria eldono de HEL-historio de Esperanto-literaturo.

Antaŭ enlitiĝo ni frandis lokan bongustan vinon aŭ bongustan bieron por nur unu eŭro.

Ĝis revido al venontaj staĝoj de Esperanto en aŭtuno en Heidelberg kaj en venonta printempo en orienta Francio.

raportis Dieter Rooke

Kiel organizanto, mi ĝojas, ke la staĝo en Rimlishof estis tiom sukcesa kaj ke la feriejo plaĉis al multaj homoj. Eĉ el Svedio aliĝis nia amiko Gunnar, kiu ekŝatis la regionon de post lia partopreno en Colmar. Li ege miris pro la preskaŭ somera vetero. Ekster la staĝo li estis gastigita de Simone kaj de Bertrand.

Komence mi tamen havis zorgojn, ĉar la nombro de komfortaj ĉambroj en la domo Arche estis limigitaj, kaj ne eblis konkontigi ĉiujn, necesis trovi solvojn, kiuj estis tamen akceptitaj.

Vendrede vespere mi montris tre malnovajn fotojn eĉ de la komenco de nia Orient-Franca Esperanto-Federacio.

Tiuj fotoj estas videblaj en nia retejo: <http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>

Ni esperu, ke en venontaj jaroj aliaj grupoj transprenos la organizadon de printempaj staĝoj.

Andreo



Je via sano



Fotis Gerold Busch

Jen raportas Manfred el Freiburg

La natura situo de tiu loko tre plaĉis al mi, ekzemple iri frumatene al la supra ebenaĵo donis belan rigardon al la valo, kaj alveno de suno. Dum tiu trankvila promenado mi renkontis junan virinon de alia grupo el Parizo kiu kun lernantoj partoprenas tutan kulturen-teatran semajnon tie. Kiam ŝi komprenis kio signifas Esperanto, ŝi interesiĝis - poste ŝi kun Ginette havis surbendigitan interparolon.

La manĝoj estis bonegaj kaj ili afable prizorgis nin kelkajn veg'etar'anojn. La sola problemeto por homoj sen aŭto estis la mankanta buso dimanĉe post la staĝo. Tial ni estis tre dankemaj al Laurent, kiu veturigis nin Freiburg-anoj kaj Sadia al la stacidomo de Colmar.

Ni vidis ke en alia domo de Rimlishof loĝas (supozeble) azilpetantoj kun pluraj infanoj. Mi ne kuraĝis informi ilin pri Esperanto, ĉar mia franca lingvo-scio ne sufiĉas por interparolo. Tamen, se ĉiu tutmonde lernus Esperanton kiel dua helplingvo, ni povus pli facile interkompreniĝi; okazus malpli da problemaj renkontiĝoj kun fremduloj.



Manfred kaj Laurent



Ankaŭ aliaj samideanoj ĝuis la belan printempan naturon

Dum la staĝo mi raportis pri AVE kaj nia Agado Per-Esperanto por subteni daŭripovan evoluon. Asocio de Verduloj Esperantistaj informas la verd-partianojn pri Esperanto, ekz-e 2017 okaze de la Tutmonda Kongreso de la Verdaj Partioj en Liverpool; en la alian direkton ni tradukas gravajn dokumentojn en Esperanton.

Dank'al la kreskanta Esperanto-Movado en Afriko kreiĝis la per-Esperanto-Agado. UN ja lanĉis 17 evoluo-celojn. Sub ĉi-tiu influo nia grupo subtenas projektojn pri trinkakvo, rearbarigo kaj pli bona edukado en Tanzanio kaj DR Kongo. Pli granda kontribuo venas de francaj samideanoj, krome el aliaj landoj, kaj en aliajn afrikajn landojn. Gravas ke ni bone interkompreniĝas kun la aliaj subtenantoj kaj kun la afrikaj aktivuloj dank'al nia laborlingvo Esperanto. Finfine ni kolektis 45 Eŭro por projekto de du

finstudintaj virinoj, kiuj volas subteni traŭmatizitajn infanojn en Goma; koran dankon al la donacantoj! Mi esperas ke mi povos rakonti pli pri tio dum nia Zamenhof-Festo.

Vi povas legi pri tio sur nia retejo: www.verduloj.org/afriko.htm

Manfred Westermayer, Esperanto-grupo Freiburg (Freiburg im Breisgau)

KONSTRUADO-kajero 2018

La asocio TAKE ĵus eldonis sian ĉi-jaran eldonaĵon, nome "**Konstruado-kajero de TAKE 2018**"

Ĝi ampleksas 82 paĝojn kaj estas ĉi-foje tutkolora. La ĉi-jara temo estas ĉefe arkitekturo kaj konstruado per brikoj. La


legantoj malkovros teknikojn, malmulte konatajn, sed skribitajn en facila, ne faka stilo.

La artikoloj estas de pluraj aŭtoroj el diversaj landoj kaj ornamitaj per pluraj koloraj fotoj.

Ĝi estas aparte mendebla per modesta kotizo je 8 eŭroj ĉe nia kasisto aŭ 20 eŭroj kiel subtena kotizo.

Jen la enhavo-listo

Enkonduko
Strata arto aŭ l'arto de grafitiaĵoj
Provizoraj domoj en Japanio post 2011
Kio eblas en konstruado per brikoj ?
Brikaj domoj en Vieno
La katedralo de Wroclavo
Evangelika kirko en Zagreb
Nubianaj volboj
Katalunaj volboj
Katalunaj Volboj PLU
Domoj JAOUL
Disvolviĝo kaj medio
Ekologiaj konstruaĵoj kaj estetiko
Domotoj, ĉu solvo ?
Novaj aldonaĵoj al betono
Hubert AGACHE urbanisto



KONSTRUADO kajero de TAKE 2018



Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

SUKCESA TRILANDA KONGRESO EN ZWEIBRÜCKEN

Pentekosto 2018 estis traŭga periodo por okazigi la tri-landan kongreson en apud landlima urbo Zweibrücken. Tiel ĝi ankaŭ estis internacia renkontiĝo por Germanio, Francio, Luksemburgio kaj kelkaj aliaj landoj de kie venis pli ol 180 partoprenantoj.

Krome la urbo Zweibrücken estas ĝemelita kun la franca urbo Boulogne-sur-Mer, fame konata pro la unua universala kongreso.

La kongresejo estis la moderna konstruaĵo de la altlernejo, bone ekipita por pluraj kunvenejoj. La tranoktejoj kaj hoteloj estis iom for de la kongresejo. Tamen surloke estis bone provizitaj la tag- kaj vespermanĝoj.

Dume en alia salono troviĝis 4 libro-servoj, inkluzive tiun de nia federacio.

Jen raportas Edmond.

De la 18-a ĝis la 21-a de majo 2018 kunvenis en Zweibrücken (Palatinato) la membroj de Germana Esperanto-Asocio, Luksemburga Esperanto-Asocio kaj Espéranto-France por sia kutima Ĝenerala Membro-Kunveno.

La 180 geesperantistojn alparolis en la amfiteatro Reinahrd Selten la prezidanto de la altlernejo, s-ro profesoro d-ro Hans-

Joachim Schmidt kaj Oliver Walz, estro de la LKK, kiu laŭtlegis mesaĝon de la urbestro de Boulogne-sur-Mer, ĝemelurbo de Zweibrücken.

Salutojn sendis ankaŭ la urbestro de Zweibrücken, s-ro Christian Gauf kaj eĉ la ĉefministriro de Rejnlando-Palatinato, s-ino Malu Dreyer.

Nu! La ĉefa ero de tia landa kongreso daŭre restas la Ĝenerala Membro-Kunveno de la landa asocio. Ni konfesu, ke la gvido de tiu kunveno fare de la estraro de Espéranto-France estis ekzemplodona. Ĉiu estrarano prezentis sian



raporton per tre klaraj sur-ekranaj resumoj kaj tabeloj. Sentiĝis dinamiko en tiu skipo, kiu meritas senrezervan subtenon.

Pro la fakto, ke iama prezidanto de Espéranto-France, Aleks Kadar iĝis Ĝenerala Sekretario de UEA, eblis malkovri la politikon de nia tutmonda ĉapela asocio, kiu nepre bezonas rekreskigi la nombron de siaj membroj. Kial tioma perdo de membroj?



Interesegeza prezento: Poliglotaĵaj Eventoj.

Plurajn interesajn prelegojn mi ĉeestis, sed permesu al mi raporti pri prelego, kiu min plej impresis, t.e. la prelego kun la titolo “Poliglotaĵaj eventoj”, kiun dinamikege prezentis Charlotte Sherping Larsson, estrarino de TEJO kaj la fakulo pri informatiko, Chuck Smith. Furoras inter junuloj poliglotaĵaj renkontiĝoj, kiuj kunvenigas ie en la mondo (ĝis nun en Eŭropo) ŝatantojn de lingvoj, kiuj mem parolas plurajn lingvojn kaj deziras diskuti en siaj lernitaj lingvoj kaj krome emas lerni pliajn lingvojn kaj amikiĝi kun alilingvuloj.

Emfazindas, ke la iniciatinto de tiuj renkontiĝoj estas junaj esperantistoj: la usona nun tutmonde konata esperantisto Chuck Smith, kreinto de AMIKUMU kaj la organiza skipo de la UK en Nitra. Jesja! Kaj dank'al ili Esperanto enas la liston de la lernindaj lingvoj. Pro tiuj kunvenoj junaj poliglotaĵoj ankaŭ lernas Esperanton. Ekzemplo plej trafa estas Charlotte Sherping Larsson, kiu ne nur fulmrapide lernis Esperanton, sed ankaŭ same fulmrapide ekaktivis en TEJO. Kia entuziasmo! Subteninda iniciato!

Sukcesega arta vespero

Same emfazindas la arta vespero. Ĝin elegante prezentis Martin Thorenz.

Ĉarmis nin unue la multnombraj diversagaĵaj belaj dancistinoj de la danca studio “Oriento de Elmira”, kiuj mirinde bele prezentis diversstilajn dancojn laŭ plej diversaj ritmoj kaj kun mirinde belaj kostumoj, kiuj ravis niajn okulojn kaj logis nin en revajn mondojn. Tondris la aplaŭdoj!

La duan parton same sukcese plenumis la koruso “Z-M-O”, kiu arigas gekantistojn, kiuj originas el orienta Eŭropo aŭ kiuj rilatas kun orienta Eŭropo. Do ne mirigis nin la dancigaj ritmoj! Sed ankaŭ imponis la nombro de la lingvoj, en kiuj ili kantis sub gvido de sia energia korusestro/

akordionisto. Sciigis nin LKK, ke ili aldonis kanton en la franca kaj en Esperanto, kiam ili eksciis, ke ili kantas dum nia kongreso kaj ke partoprenos francoj.

Kaj venis Pjer kun sia gitaro kaj FAMO kun sia akordiono, du el la kutimaj tri KOMPANOJ. Jam dum la 100-a UEA-kongreso en

Lille LA KOMPANOJ triumfis. Kaj denove la kantoj de la fama Jacques BREL entuziasmigis nin.

Eblis aĉeti ilian KD-on BREL EN ESPERANTO. Mi ĝin plurfoje sinsekve aŭskultadis en mia veturilo dum la hejmenveturado. La voĉoj belegas, la esperantaj tekstoj mirindas kaj la orkestra akompano rimarkindas. Aĉetinda VINILKOSMAĴO!!!!

Mi finu per danko al LKK kaj ties estro, samideano Oliver Walz pro la ege agrabla kongreso. Ankaŭ belis la vetero kaj bonegis la manĝoj. Kion plian ni postulu?

Edmond LUDWIG





Sabate posttagmeze okazis la ekskurso al Pirmasens. Jen Martin Thorenz, kiu lerte gvidis la ekskursantojn. Unue ni veturis tien per buso, ja nur je 25 km de Zweibrücken kaj poste piede tra la urbo.

Origine ĝi estis nur vilaĝo en la Palatinata Arbaro kun ĉasista kasteleto. En la jaro 1763 la grafo Ludwig 9-a de Hessen-Darmstadt decidis fari el Pirmasens garnizonan urbon kaj i.a. konstruigis la duan laŭ grandeco en Eŭropo militistan ekzercejon. Kvankam hodiaŭ du trionoj estas kovritaj per stratoj kaj konstruaĵoj, la restanta triono ankoraŭ donas ideon pri la iama grandeco de tiu placo. Tie nun staras la nova urbodomo kaj regule okazas foiroj. En la zono por piedirantoj troviĝas la malnova urbodomo, la ŝuo-muzeo kaj la katolika pregejo de S. Pirminius. En la forumo de la malnova poŝtejo hodiaŭ okazas artaj ekspozicioj kaj aliaj kulturaj eventoj. En la renovigita konstruaĵo de iama ŝu-fabriko (Pirmasens havas longan tradicion de ŝufarado) antaŭ 10 jaroj malfermiĝis scienca centro "Dynamikum"-muzeo kun multaj eblecoj kunagi. Tuj apude vi trovos la Strecktal-parkon konstruitan de 1998 ĝis 2001: multifunkcian pejzaĝan parkon ekipitan por sportoj, promenado kaj malstreĉigo.



La katedralo kaj ties fontano sur deklivo



Virinoj, kiuj siatempe iris piede por transporti kaj vendi ŝuojn survoje, ŝajne eĉ ĝis Parizo.



Andreo

Sun-horloĝo en la centro "Dynamikum" Ĝia ciferplato povas adaptiĝi por montri la vintran aŭ someran horon.



Fotoj de Andreo

Karaj gesamideanoj,



Malfermante la retejon de Libera folio mi malkovris la jenan titolon: **UEA nuligas la Jarlibron kaj altigas la kotizon.** Nu! Ke la kotizon oni altigu por plueldoni papere la Jarlibron, tion mi povus kompreni, sed altigi kaj tamen nuligi!???

Laste - tio estis antaŭ kelkaj monatoj - mi havis la okazon sperti la utilon de nia delegitaro. Klare, mi povintus sperti la saman servon per elektronika versio, sed ŝajnas, ke neniu inter niaj eminentuloj kutimas deĵori en budo reklamanta pri Esperanto. Kiel plej taŭge reklami pri niaj servoj, se ne per **paperaj palpeblaj versioj** de la Jarlibro kaj de Pasporta Servo!

Se ni daŭrigas per la sama logiko, ni ankaŭ ne plu eldonu paperajn librojn! Ĉu ili ne komprenas, ke monstro de peza *PIV* aŭ de *La granda Kaldrono*, aŭ de *La Pupo*, aŭ de *Morto de Artisto*, ktp. alimaniere impresas ol listo de retpaĝoj! Same konkrete informas foliumeblaj revuoj imponantaj pro sia diverseco. **Imagu iam librofoiron sen libroj!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!**

La strato de Tanja Vivo en Rusio 1917 – 2017 Kalle Kniivillä

Jen la kvara libro de la finna ĵurnalisto Kalle Kniivilä. Denove li enketis pri la vivo en Rusio, pli precize pri la vivo en Rusio dum tuta jarcento, de 1917 ĝis 2017. Kio originalas, tio estas la decido sekvi familiojn, kiuj vivis en la sama strato en la urbo Leningrado-Sankt-Peterburgo kaj travivis la bolĉevikan revolucion, la komunistan Sovetunion kun Lenin, la postan Stalin-an teroron, la Duan Mondmiliton, kaj la tutan post-stalinan malrapidan degeladon ĝis la nuna prezidenteco de Vladimiro Putin.

Dank'al la pli intima konatiĝo kun precizaj homoj eblas kunsenti la terurajn travivaĵojn de tiuj familioj, sed ankaŭ ties ĝojojn kaj esperojn. Okcident-eŭropaj legantoj eĉ sukcesos kompreni, kial iuj inter tiuj personoj foje sopiras je la malnova tempo aŭ kial aliaj admiras la en okcidento ege kritikatan prezidenton Putin.

Legu kaj malkovru!

E. L.


La ĝermana dialekto PLATT parolata ankaŭ en Suda Ameriko

La regiona gazeto DNA prezentas Solange Hamester-Johann, kiu iĝis kutima prelegantino en la Platt-Festivaloj, ankaŭ dum la 20-a festivalo en Sarreguemines. Ŝi estas brazilano de Rio Grande do Sul kaj lernis tiun ĉi dialekton infanaĝe. Platt estas ĝermanlingva dialekto parolata en Mozelo, norda Alzaco, Sarlando kaj Luksemburgio. Sed ŝi lernis ĝin en la sudbrazila regiono, kiu grandas kiel la tuta Francio.

Kiu scias, ke Platt estas la dua plej parolata lingvo de Brazilo post la portugala? Inter du kaj tri milionoj da personoj ĝin parolas en la provincoj de Rio Grande do Sul, Santa Catarina kaj Santana. Sed ankaŭ ekzistas parolantoj en Argentino kaj Paragvajo.

Platt estas parolata tie dank'al la princino Maria Leopoldina de Habsburgo-Lotaringio, kiu edziniĝis – fakte laŭ la tiamaj kutimoj “estis edzinigita”-en 1822 kun la tiama koloniestro de Brazilo, Dom Pedro, filo de la portugala reĝo João la VI-a. Laŭ la historiistoj tiu viraĉo estis ege malamata de sia popolo, kiu male ŝategis la kleregan Maria Leopoldina. Ŝi ege zorgis pri la malriĉuloj. Ŝi ankaŭ invitis loĝantojn de Loreno, Palatinato kaj Sarlando al Brazilo, donacante al ĉiu familio 75 hektarojn da tero.

Solange Hamester-Johann klarigis, ke **multaj mecenataj entreprenoj subtenas la instruadon de tiu lingvo.**

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		


Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Simone KIRY		Forpasis la 16an de junio 2018
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzyves@gmail.com
S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@gmail.com	

Abono al La Informilo →	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Per internacia ĝiro →	IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	

1. Poliglotoj	15. Staĝo en Heidelberg Bavelo	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. Staĝo en Rimlishof	16. Agado per Esperanto	
3. Staĝo en Rimlishof	17. Luminesk 2018 + HDP	
4. Staĝo en Rimlishof	18. Lorena pomarbo	
5. Staĝo en Rimlishof + TAKE	19. Enigmtoj kaj anekdotoj	
6. Trilanda kongreso Zweibrücken	20. Amika tago	
7. Trilanda kongreso Zweibrücken	21. Amika tago + Simone	
8. Trilanda kongreso Zweibrücken	22. Renkontiĝo en Lviv Ukrainio	
9. Angulo de la prezidanto	23. Renkontiĝo en Lviv Ukrainio	
10. Komitatoj kaj Menuo	24. Renkontiĝo en Lviv Ukrainio	
11. Avula Angulo	25. IFEF-kongreso Vroclavo	
12. Semajno en Metabief	26. IFEF-kongreso Vroclavo	
13. Semajno en Metabief	27. IFEF-kongreso Vroclavo	
14. Libro-servo	28. Foto-paĝo pri Zweibrücken	

AVULA ANGULO

Armand HUBERT

... alflugas rememoraĵoj!

Dum koŝmarigis mondmilito, mia lorenaj regiono (departemento Moselle) estis aneksita al la nazia “Reich” ĝis sia Liberigado en 1944-45.

KIAM FIDO PERFIDAS

1940. En mian regionon alvenis “Siedler” el Sarlando, t.e. kolonianoj, germanaj invadantoj surprasantaj la regadon de farmbienoj, kiujn postlasis forigitaj lorenaj franclingvanoj. Tiuj alvenintoj kondukis kiel venkistoj. La postenon de “reĝisoro” de la vilaĝa vivo ekprenis iu S-ro Gross, kun strikta devo provizi nutraĵon “por la finvenko”. (Kaj cele de germanizado de la enloĝantoj). Li rolis kiel “okulo kaj orelo” de la nazi-ŝtato.

S-ro Gross estis viro ŝajne ĉiam en komando-stato. Ne parolema, sever-miena. Ni salutis lin humilece. Lia apero en la stratoj naskis timon en ĉiu domo: la dommastrinoj sekvis lian iradon malantaŭ la kurtenoj. Sekreta demando estis: kio denove plue surfalos nin. . . ?

S-ro Gross estis eksa karboministo. Li estris la farmmistaron nome de la reganta nazipartio. Unu inter la signoj de potenco estis dimanĉa parad-marŝado.

Dimanĉe matene la viroj ariĝis ĉe la preĝejo en brunaj uniformoj kaj al-liniiĝis; tiam komandokrioj sonoritis, botoj ekklakis kaj dorsrigida teamo ekmarŝis brue, takte tra la vilaĝo.

Tio je preciza horo: je la deka. . . ĝuste kiam Lorenanoj kutimis iri preĝejen.

La publika kaj orgojla okazaĵo stampis aneksigon. Sentigis submetigon.

Nu! Ni buboj observis la spektaklon per scivolemaj okuloj, dum la gepatroj akceligis la preter-iron. Ĉar la tuta vilaĝo estis survoje al preĝejo, kiam la germana skipo piedbatis la bitumon de la stratoj.

Por ni la dimanĉa meso ene de preĝejo estis feliĉa horo en florumita loko! Estis kiel privata sfero por Lorenanoj, ĉar la fremduloj ne eniris la sanktejon. La sonoriloj de la preĝej-turo, kiel pactempe, gaje vokis la paroĥanojn al diservo. La ceremonia kunesto iĝis eta festo kun muziko kaj kantoj. La preĝojn fervore praktikis la ĉeestantoj; la etoso

estis varma inter samlandanoj. Tiu dimanĉa horo estis tempo de restado en grandiganta etoso, famili-simila, esperiga.

Sed iam, jen fulmotondro sur la vilaĝo!

La filo de S-ro Gross-deknaŭjara, gaja, vivoplena juna homo-estis mortpafita sur militfronto. Ĉiuj enloĝantoj estis ŝokitaj; ĉagreno kaj kondolenco surfalis la vilaĝon. La invadularo, la “siedler-oj”, streĉe spertis la cinismon de la mortiga militmaŝino. Milito ja ne nur estas venkanta okazaĵo, sed duflanke ege suferiga.

Tiam la ĝisnuna fido de la “Siedler” ektremis kaj. . . ekruiniĝis.

1941. S-ro Gross forstrekis la dimanĉan parad-marŝadon en mia vilaĝo.

LEGAĴO

FAÏZA GUÈNE, verkistino, en MILLENIUM BLUES

Faïza Guène, juna verkistino, bedaŭras la nunan senfidecon de la junularo, de la Y-a generacio.

Ni ĵus travivis. . . krudajn dudek jarojn. Mia generacio multflanke spertis disreviĝon. Niaj gepatroj ankoraŭ enestis epokon, kiam duopeco havis sekurigan valoron-malgraŭ divorceblo -, kiam laboro eblis dum 30 jaroj en sama firmao, kiam daŭris certeco, ĉu dekstro, ĉu livo en politika sfero, kiam daŭre ekzistis ia maniero kunesti, kiu hodiaŭ disfalas.

Ĉio ŝanĝiĝis tiel haste. . .

Tio, kion oni kredas, ĉiam estas io pli granda ol ni mem, pli forfika. Estas tio, kio helpas ellitiĝi matene. . .

Mi ŝatus, ke la junuloj retrovu ĝeneralan fidon je nia lando, je sia registaro, je justeco kaj egalrajteco. Trista mi iĝas, kiam nun pli kaj pli da kialoj nin disigas, anstataŭ unuigi.

*: intervjuo en la revuo La Vie /N° 3779

POST LEGAĴA PRIPENSO:

Ĉu nia Respubliko ne sukcesis transdoni vivcelojn al sia junularo?

Restadado de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto 2018 en Métabief en la Alt-jûraso kun aŭ sen staĝo de esperanto

Gastejo

“Les Sapins de l'Amitié” (La Abioj de l'Amikeco) estas ĉaledo, kiu kapablas akcepti 80 homojn (grupojn, familiojn...) tutjare.

Ĝi situas en la centro de Métabief, mezmontara skiejo, apud la svisa limo.

La gastiga skipo (dungitoj kaj bonvolemluloj) akceptos vin kaj zorgos pri via restado en 4, 6 aŭ 12-litaj dormoĉambroj ĉe la 1a aŭ la 2a etaĝo.

Estas ankaŭ granda teraso kaj ĝardeno (4000 m²)

Nia kuiristo kuiras bonkvalitajn manĝojn kaj proponas adaptitajn manĝojn laŭeble.

Purigado de la manĝilaro estas mane farita de la feriantoj mem (amika kaj muzika etoso!).

Same ni bezonos vin por pretigi kaj malpretigi tablojn.

Partoprenantoj, kiuj deziras pli da komforto, rezervos hotelon aŭ alian gastejon.

Ili povas nur tagmanĝi kaj vespermanĝi kun la aliaj partoprenantoj en la ĉaledo.

Eblos restadi nur kelkajn tagojn

Aktivaĵoj (decidu je la komenco de la restado)

- Malkovro de la regiono: piedmigrado, aŭto; ĝia faŭno kaj flaŭro
- Akva sportumado ĉe la lago de Malbuisson: naĝado, pedal-boato, ... arbar-aventurejo, Keglo-ludejo.
- Vizitoj: Fromaĝejo, Fumaĝejo de ŝinko kaj kolbaso, Château de Joux (kastelo), Natur-rezerveja domo de lago de Remoray, Montara muzeo en La Chapelle des Bois, fonto kaj akvofalo de la rivero Doubs, Citadello de Besançon, Salejoj d'Arc et Senans kaj Salins-les-Bains, Grotoj de Vallorbe, ktp.

Tri aŭ kvar nivelaj kursoj eblas: Komencantoj / komencintoj, Progresantoj, Paroliga kurso

kun Stano Marček, Nina Korjenskaja, Roland Cuenot, Jacqueline Poux.

Disvolviĝo de la restado kun kurso:

Dimanĉon 19-an: akcepto posttagmeze, aperitivo

Lundon 20-an: eko de la kursoj

Semajne

- 8a- 8a45: matenmanĝo
- 9a15-12a: kurso (paŭzo je la 10a30)
- 12a30-13a15: tagmanĝo
- 14a-17a: aktivaĵoj
- 17a15-18a30: kurso aŭ agado
- 19a15-20a: vespermanĝo
- 20a30: vespero (ludo, prelego...)

Disvolviĝo de la restado sen kurso:

bonvolu ĉeesti akurate la manĝojn, (Pikniko por tagmanĝi eblas).


Kursfino kaj agad-fino: sabaton vespere

Fino de la restado : dimanĉon la 26an post la tagmanĝo.

Ni proponas turisman aranĝon, dimanĉon la 26an de aŭgusto

- 9 a: Veturado laŭ la rivero Loue
- 10a: Urbo Ornans kun Muzeo Courbet (impresionisma pentristo)
- 12a30: Pikniko
- 14 a: Vizito de “Taillanderie” (fabriko pri klingoj de laboriloj, per akvo energio), en vilaĝo Nans-sous-Sainte-Anne

Prezo: 40€ inkluzive dimanĉa vespermanĝo, nokto, matenmanĝo kaj vizitoj, pagota en la ĉaledo.



Bulletin d'inscription / Aliĝilo

à renvoyer à / al Anne-Marie FERRIER 20 rue de la Chesnaie

FR-71530 FRAGNES - LA LOYERE Tél: 336 78 45 60 49

ou/ aŭ al Vincent GERBE 40 Chemin des Peupliers FR69300 CALUIRE

Courriel: stagemetabief@orange.fr

<p><i>Pour inscrire une famille, inscrivez chaque personne séparément.</i> <i>Por familio, ĉiu persono sendu apartan aliĝilon</i></p> <p>Nom (familia nomo) : Prénom (persona nomo) : Adresse (adreso) :.....</p> <p>Pays (lando) :..... Téléphone (telefono) :kun landokodo: Adresse courriel (retadreso) :</p>	<p>Hébergement du 19 au 26 août 2018</p> <p>Restado-kosto de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto 2018 300 € 7 nuits par personne/ 7tranoktoj por unu persono</p> <p>Pour les personnes ne logeant pas au chalet Por la personoj sen tranoktado en la ĉaledo sed nur manĝoj 200 €. 2 repas/jour par personne (2 manĝoj tage por unu persono)</p> <p>Participation au stage d'Espéranto 60 € Partopreno al la staĝo de Esperanto</p> <p>Inscription après le 20 juillet (aliĝo post la 20a de julio) + 30 € Séjour de qq jours seulement restado dum nur kelkaj tagoj 50 €/tage Précisez les dates/ Indiku la tagojn</p> <p>Total / Sumo</p>
--	---

L'hébergement comprend: la nuit, le petit déjeuner et 2 repas avec boissons.

La restado-kosto entenas: tranoktadojn, matenmanĝojn kaj 2 manĝojn tage kun trinkaĵoj.

Pratique alimentaire/ Manĝo-preferoj

Je mange de tout Végétarien Végétalien Sans porc

Mi manĝas da ĉio Vegetarano Vegano Sen porkaĵo

Pour les cours d'Espéranto, notez le cours suivi - elektita kurso

Pour les cours d'Espéranto, notez le cours suivi / pri esperanto-kursoj (elektu)

Débutant Perfectionnement

Conversation

Komencanto Perfektiĝo Parolado

Je paie 100€ à l'inscription et le reste pendant le séjour

Mi antaŭpagas 100 eŭrojn aliĝante kaj la ceteron surloke, dum la staĝo.

Par chèque à l'ordre de "ESPERANTO EN CHALONNAIS"

Par IBAN per bankĝiro

CME CHALON SUR SAONE

Intitulé du Compte / al la konto :

ESPERANTO-EN-CHALONNAIS

IBAN: FR7610278025740002039720135

Code BIC (Bank Identification Code) - Code **swift**:

CMCIFR2A

ĝirocelo: notu / Comme motif du virement notez:

stage du 19 au 26 août 2018 et votre nom, kaj via nomo

Lieu / Loko..... Date / Dato..... Signature / subskribo

Merci de consulter l'offre d'été de Grésillon, château de l'espéranto, cliquer : <http://gresillon.org/ete>

Vidu la someran oferton de la franca Esperanto-kastelo Greziljono, klaku: <http://gresillon.org/somero>

9 - 27 juillet 2018 2^e Cours d'espéranto marathon pendant 18 jours (7 5 6) avec

Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Korjenevskaja, Mikaelo Bronštejn

- 9 - 16 juillet 2018 4^e Échanges de savoirs et de savoir-faire et cours d'espéranto
- 15 - 21 juillet 2018 Une semaine de visites guidées en Anjou avec *Catherine Kremer*
- 16 - 21 juillet 2018 Semaine spéciale avec des cours d'espéranto
- 21 - 27 juillet 2018 30^e Conférence Internationale d'Espéranto d'OSIEK « Espéranto dans les Arts »
- 11 - 19 août 2018 8^e Semaine festive pour enfants et familles

Inscrivez-vous 2 mois en avance pour profiter de la réduction

Aliĝu 2 monatojn antaŭe por ĝui reduktion



Kulturdomo de Esperanto
Kastelo Greziljono



El nia libroservo

Informoj



--> La libroservo partoprenos la venontan komunan seminarion en Heidelberg la 12/14ajn de oktobro 2018

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est: <http://esperanto.france.est.free.fr>. Se iu libro precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!

Ĝis baldaŭ!


Jean-Luc Thibias
libroservo.efe@laposte.net




Nove alvenintaj libroj



①



②



③



④

- 1) **Mi inventas la mondon**, Poezio,, **Wisława Szymbowska**, *Opo*, 2015, 340 paĝoj. **14,50 €**. . Tradukitaj poeziaĵoj de nobelpremiitino.
- 2) **La Muelilo de la Fortuno**, Novelo, **Ioan Slavici**, *Flandra Esperanto Ligo*, 2017, 160 p, **15 €**. "La plej populara romaneto de la aŭtoro. La nuna leganto facile komprenos, ke kiam temas pri avareco, intrigoj kaj malhumaniĝo, ne multo ŝanĝigis en la lastaj jarcento kaj triono (komento de UEA)"
- 3) **La Pupo**, romano, **Boleslaw Prus**, *Swidnik-bjalistoko-Durdevac*, 2016, 660 paĝoj **15 €**
Internacie konata romano de la verkisto de la "Faraono" (kies modela traduko far Kabe estis inter la unuaj en esperanto), Tiun ĉi verkon tradukis kaj komentis nia samideano Tomasz Chmielik
la tre favora prezo de la Pupo validos nur ĝis la elĉerpiĝo de la nuna stoko
- 4) **Kaj baldau alvenos Blukat !!!**

Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net"
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"
IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97
BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

Mendilo		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:

**Kursoj:**

- A1** komencantoj 1 (Barbara Bertrand)
- A2** komencantoj 2 (Gerold Busch)
- P** paroliga (Edmilson Lima Serejo)
- B** Bukedo kun diversaj prelego-
“floroj” de pluraj prelegantoj (detaloj en la supra teksto)
- i** Infanprizorgado por infanoj (2-10-jaraj) (C. Majer, S.+F. Vogler)

En Hajdelberg' mi perdis mian koron ... estas konata germana studenta kanto.

Pri Heidelberg ne necesas multe diri, jam ĉiuj konas sian famon: la universitaton (plej malnova en Germanio), la kastelon detruitan de la “suna reĝo”, la plej grandan vin-barelon de la mondo (bedaŭrinde malplenan), la faman malnovan ponton trans rivero Neckar ... Kelkajn el tiuj vidindaĵoj ni povos mem spekti dum la sabat-posttagmeza ekskurso.

En la seminario vi povas elekti inter la klasikaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. La bukeda kurso prezentas diversajn interesajn temojn:

- ◆ Kiel plibonigi la komunikadon inter malbon-aŭdantoj kaj bon-aŭdantoj? (Alois Eder)
- ◆ Ruslando estas nia najbarlando (Ulrich Brandenburg, emerita ambasadoro de Germanio en Ruslando kaj nun prezidanto de Germana Esperanto-Asocio)
- ◆ Germanaj specialistoj en Sovetunio – sekve de la milito (Karl Breuninger).
- ◆ La Demokrata Respubliko Kongo plej riĉa kaj plej malriĉa ŝtato de Afriko – kiel ni rilatas al tiu dilemo (Manfred Westermayer, Alois Eder).

**Kostoj:**

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Restado en la junulargastejo, kompleta pensio por 2 tagoj:
en 4-lita ĉambro 95 € en 2-lita ĉambro 120 €

Aliĝilon bonvolu sendi al: inge.simon@esperanto.de

aŭ poŝte al S-ino Inge SIMON, Brünner Str. 20 DE-73431AALEN

Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy

per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

ret-adreso: andreo.ag15@sfr.fr

Programskemo**vendredo, 12a oktobro**

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj

18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo

19:00 - 20:00 kurso – parto 1

ekde 20:15 amuza programo kun Christoph Frank poste knajpo

sabato, 13a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

09:00 - 11:45 kursoj de ĉiuj niveloj

12:00 - 13:00 tagmanĝo

14:00 - 17:00 ekskurso por ĉiuj: urbo- esplorado

18:00 - 19:00 vespermanĝo

19:00 - 20:15 kurso

ekde 20:30 amuza programo kun Christoph Frank poste knajpo

dimanĉo, 14a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

08:30 - 09:00 redono de ĉambroj

09:30 - 11:30 kursoj

12:00 - 13:30 tagmanĝo, adiaŭo kaj poste eblas komune ekskursi al la loka Hajdelberga monto Königsstuhl kun elstara rond-rigardo.

Aliĝilo

Mi ĝiras _____ eŭrojn al BAVELO-Konto

IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22 - BIC: SOLADES1VSS .

aŭ al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy

Mi partoprenas ...

la kurson A1 / A2 / P / B / i .

Mi volas dormi en ...

2-lita ĉambro ve/sa sa/di

4-lita ĉambro ve/sa sa/di

Mi serĉas pli komfortan tranoktadon kaj petas helpajn informojn pri tio.

Manĝoj en la junulargastejo:

vendredo sabato dimanĉo

matenmanĝo

tagmanĝo

vespermanĝo

Mi volas vegetarajn manĝojn

Mi volas veganajn manĝojn

Mi havas alergion kontraŭ _____

Nomo, adreso, tel.n-ro kaj retadreso,

DJH Jugendherberge Heidelberg International



Tiergartenstraße 5, 69120 Heidelberg
(Koordinatoj: 49.416039 N, 8.659631 E)
Tel: +49 (0) 6221 651190
jugendherberge-heidelberg.de

Agado Per-Esperanto por subteni daŭripovan evoluon 2018-05-01

UN lanĉis la 17 novajn evoluo-celojn. La Esperanto-Movado kunlaboras rilate daŭripovon:

- unue informas pri Esperanto kaj instruas ĝin;
- due agadas por Esperanto en evoluigantaj landoj;
- trie agadas per Esperanto subteni evoluon ĝenerale.

Necesus organiza subteno flanke de UEA kaj SAT kaj de naciaj Esperanto-organizaĵoj tiel ke la financaj subtenoj povus esti kolektataj pli efike kaj regule, subtenante la agadon de unuopaj grupoj (kiel AVE) aŭ personoj. Subteno temas pri:

1. Formalaj donaco-kvitancoj por la financ-oficejoj de unuopaj ŝtatoj (ekz-e EU-vasta fonduso), tiel ke donacantoj povas redukti sian impostopagon, aŭ ricevas validan kvitancon kio ĉefe gravas se firmaoj aŭ aliaj fondusoj donacas.
2. Inform-kolekto pri kvalito de tiaj projektoj; unue kiel datum-bazo kaj due indus havi konfirmon de neŭtrala persono pri la faritaj projektoj malgraŭ tio ke kompleta garantio ne eblas.

Ekzemple: AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj, kunlaboranta fak-asocio de UEA pri Ekologio) kunlaboras kun aliaj grupoj da esperantistoj kaj eĉ ne-esperantistaj grupoj subtenadi projektojn ĉefe en Tanzanio kaj D. R. Kongo.

AVE feliĉe trovis german-lingvan fonduson kun kiu ni bone kunlaboras, sed preferus Esperanto-fonduson.

“**Mazingira**” (vilaĝaro Ketare/Marambeka en nord-okcidenta Tanzanio proksime de Bunda), surloke organizita de esperantisto Mramba Simba; kunlaboro kun AVE ekde 2006, kaj kun aliaj eŭropaj grupoj:

- putoj por trinkakvo, krome kolekti pluvakvon por bestoj kaj akvumi la ĝardenojn
- lernej-kostoj por orfoj, por materialo kaj “uniformo”
- konstruado de dua mez-lernejo “Esperanto Secondary School” en Marambeka (ESS)
- agrikulturo, sunflora oleo, kaj rearbarigo i.a. per frukt-arboj
- regajneblaj energioj (fotovoltaiko, pli efikaj kuir-fornoj)
- operacioj de kripligitaj infanoj, ofte pro injekcio de ĥinino kontraŭ malario

Mazingira-Projekto 2017: internato por lernantinoj

ĉe ESS Marambeka, ĉar kelkaj estis perfortitaj sur la longa vojo (ĝis 10 km) – ni subtenis domon por 24 knabinoj; “Wilde Gansen” alian por 80!. Ili loĝos tie ĝis la ferioj, ricevos nutraĵon de gepatroj. Ni kolektis 6.200 Eŭrojn, i.a. 5.200 de “Cents-for-help” de Bosch-dungitaro (dank'al organiza subteno de Janek Bender). **2018** necesas ankoraŭ mebloj kaj manĝejo kun salonoj por lerni kaj renkontiĝi; entute ĉ. 2000 Eŭroj.

“**Akvo por Kalima 2018**” (80 mil da enloĝantoj, kune kun Kakutya 130 mil), provinco Maniema, D.R.Kongo: - komence, 2013, -ni subtenis la agadon de esperantisto Etienne Katchelewa, kiu studis agrikulturon, fondis la

kooperativon PIEADC, enkadre de ĉi-tiu:

- subtenis por aĉeti materialon re-aktivigi fiŝ-lagojn; kaj kultivi legomojn.

Multaj bildoj pri Kalima sur retejo de Betty:

<http://rosejo.blogspot.dk/>

- 2017 ni jam financis la 4-an projekton de Etienne “Akvo por Kalima”, provizi trink-akvon por ĉ. 9 mil homoj, ĉar nur malmultaj havas aliron al salubra trink-akvo.

- 2018 konstrui akvo-prenejon je Abuki-rivereto sur monto Abuki. Bezonatas 38.000 Eŭroj: 25 mil de ministerio pri ekonomia kunlaboro, 10 mil de fonduso de iu firmao, 3 mil de samideanoj; kaj krome pri materialo kaj laboro surloke (ĉ. 3 mil) – ne kalkulita en tiu sumo.

Estonte la kooperativo povas ĉerpi sufiĉe da mono el la vendo de akvo, por etendi la provizon al la tuta urbo.

Uvira, Suda Kivuo, D. R. Kongo-Martin Fadhili Enzo:

- lernopago por **orfoj** (momente ni subtenas 2)

- **Rearbarigo** kaj ĝardeno-projekto (malgranda projekto komence de Aŭgusto 2017):

Martin plendis ke oni forhakis arbarojn dum la militado, kaj poste pro la uzado da ligno-karbo. Necesus konstrui kuir-fornojn, kiuj estas pli efikaj, aŭ sun-fornojn, kiuj reduktos la bezonon da ligno-karbo.

Kune kun lernantoj li kultivis diversajn arbidojn kaj donacis al kamparanoj por planti ilin en la regiono de Uvira (proksime de la lago Tanganjika). Kiel ni lernis de Wangari Maathai rearbarigo estas la kondiĉo por teni la akvon en la regiono, kaj ricevi pli da pluvo kaj trink-akvo. Krome Martin ankaŭ kultivos legomojn por bona nutraĵo. Li subtenas grupon da lernantoj, kiuj ankaŭ lernas Esperanton. Dum la ferioj (kaj la pluv-sezono) en Aŭgusto ili laboris. La projekto ricevis ĉ. 1400 eŭrojn, i.i. 400 de “Amikoj de Wangari Maathai”.

Psiko-socia apogo en Goma ... por traŭmatizitaj infanoj, ankoraŭ ne tute klara projekto.

Aliaj samideanoj (Alphonse en Goma, . . .) petas subteni similajn evoluo-projektojn, subteni lernantojn kaj studentojn. Mi volonte disdonas la informojn.

Rearbarigo en Niĝerlando, pli efikaj kuir-fornoj ...

Mi petas vin subteni la per-Esperanto-Agadon laŭ viaj eblecoj, aŭ mem agadi:

UEA-Konto de AVE: avex-z (menciu la projekton)

Se vi ne havas UEA-konton eblas pagi al nia kasito:

André Grossmann, kiu transpagos pere de TAKE

Koran Dankon!

D-ro Manfred Westermayer

(Asocio de Verduloj Esperantistaj)

Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio

ret-adreso: manfred@westermayer.de

AVE: www.verduloj.org/afriko.htm

<http://rosejo.blogspot.dk/>



27.12.2018 – 03.01.2019
Königswinter / Germanio

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la kvaran fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.



Por LUMINESK' 2018/2019 ni ĉifoje elektis la urbeton Königswinter ĉe la Rejno apud Bonn, poŝtkodo 53639. La loko estas facile atingebla per aŭtoŝoseo kaj publikaj trafikiloj (fervojo kaj tramo). La plej proksima ĉefstacio estas Bonn Hauptbahnhof. Königswinter estas konata kiel ekskurs- kaj ferioloko. Ĝi situas en bela pejzaĝo inter la

Rejno kaj la montaro Siebengebirge, al kies plej alta monteto Drachenfels kondukas dentorada fervojo. Al Bonn ligas ĝin i.a. tramlinio kaj pramŝipo. Ni planas ekskursojn en la ĉirkaŭaĵon de Königswinter kaj al Bonn, naskiĝloko de Beethoven kun longa historio kiel universitata urbo, kiu dum jardekoj servis kiel ĉefurbo de la Federacia Respubliko Germanio kaj ĝis hodiaŭ restis politika centro i.a. por suborganizoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Luminesk'-kunveno estas la JUFA-hotelo Königswinter en la naturparko Siebengebirge iom super la urbeto. Ĝi apartenas al ĉeno de junularaj hoteloj jam konataj al partoprenintoj de la Internaciaj Festivaloj en Nördlingen kaj Jülich. Kunven-ĉambroj, restoracio kaj trinkejo troviĝas en la domo.

Aliĝilo kaj pliaj informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/pri-luminesk>
 Okaze de bezono, nia kasisto pretas peradi viajn antaŭpagojn

Hans Dieter Platz (HDP) †

Intertempe ni eksciis pri la trista informo, ke Hans Dieter Platz forpasis la 20-an de aprilo. Li, kiu en la esperantista mondo estis konata sub la mallongigo HDP, estis multflanke aktiva homo, kiu tamen plej konatis pro la Internaciaj Festivaloj, kiujn li brile organizis dum 30 jaroj kaj kiu estis la plej konata jarfina Esperanto-aranĝo en Germanio.

Li forpasis, sed daŭre vivos en niaj koroj.



[Présentation](#)

[Sommaire](#)

[La langue internationale](#)

[L'Espéranto dans le monde](#)

[IF-arkivoj](#)

[Deziras korespondi](#)

[Histoire d'Espéranto France-Est](#)

En la retejo de nia federacio Esperanto-France-Est troviĝas nun ligo al la iama retejo de HDP. Per alklako de IF-arkivoj eblas aliri la retejon de IF, kiu fakte montras la informojn de 2008 ĝis 2014. Krome ĉe "albumo" eblas trovi fotojn kaj raportojn eĉ de la plej unuaj IF en 1979-1980. Certe la tuto prezentas interesajn historiajn eventojn.

<http://esperanto.france.est.free.fr>

En tiu menuo troviĝas ankaŭ la linio "Histoire d'Espéranto France-Est". Tiel eblas atingi la retejon de la historio de nia federacio.

Ĝis la jaro 2001 eblas trovi informojn de la tiamaj numeroj de la Informilo en formato html. Ekde 2002 la tiamaj numeroj estas alireblaj en formato pdf. Ili estas skanitaj fare de Jacques Herlé, kiu daŭre laboras kaj iom post iom atingos la jaron 2013. Ekde 2014 la pdf-versioj estas tiuj senditaj al la retaj abonantoj.

Andreo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆
 ☆ Kelkaj novaĵoj pri la esperantaj pomarboj en Loreno ☆
 ☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆



Printempe, la pomarboj denove kreskis.

Tiu de Liliane, dum majo, estis 114 centimetrojn alta. Kelkaj afidoj, loĝantaj formikoj, vizitis ĝin kaj ĝiaj folioj volviĝis.

Taŭga ŝprucado de nigra sapo solvis la problemon.

Tiu de Gisèle miskreskis, pro malfrua transplantado nur en lasta aŭtuno.

Ekde aprilo, la antaŭa kreskaĵo pereis sed du novaj fortikaj branĉetoj naskiĝis kaj kreskis.

GB kaj LB



Mia unua aŭtomobilo

Mi ĵus sukcesis la ekzamenon de la veturpermeso. Do, mi decidis aĉeti mian unuan aŭtomobilon. Ĉar mi ne havas multe da mono, mi serĉis jam uzitan veturilon. En la ĵurnalo, mi konsultis la anoncetojn. jen mirakle! Unu tiklis min: eta, sporta flavkolora veturilo!

Mi tuj kontaktis la vendanton por rendevuo. La morgaŭon, post mia laboro, mi rapidis por vidi la mirindaĵon kun amiko.


Noktiĝis kiam ni alvenis. Ni estis tre bone akceptitaj. Je la unua provo la motoro ekfunkciis.

Do la afero estis rapide fintraktita. Post la pago de la interkonsentita prezo, mi rehejmeniĝis veturile.

Fiere mi montris al miaj aliaj geamikoj en la posta tago mian novan akiraĵon. Kun kelkaj inter ili, ni decidis vojaĝi la postan semajnfino al Parizo. Dum eta paŭzo, unu amiko apogis sin sur la alo de la dekstra antaŭa rado. Subite lia mano malaperis ĝis la kubuto. Ni ekridegis pro tiu strangaĵo.


Kio okazis?

La fripona vendanto anstataŭigis la rustajn karoserierojn per. . . . Kartono.



Gisèle Bertapelle

Ni lernu per enigmoj kaj humoraĵoj



Ni ridu

JG

Du amikoj trinkas bieron sur restoracia teraso. Unu daŭre pli kaj pli nervoziĝas.

“Jes, ŝi planis esti ĉi-tie jam antaŭ dudek minutoj!

Mi timas, ke ŝi tute ne venos!

-Kvietiĝu! Mi bone konas virinojn! Se ŝi malfruas, tio signifas, ke ŝi venos!”

Iu junulo invitis geamikojn por festi vespere sian naskiĝ-datrevenon.

Agrabla etoso disvolviĝas ĝis malfrue en la nokto. Iu ĉestanto iĝas scivolema pro pendanta gongo ĉe la muro en la koridoro

“Je kio, tio utilas ?

- Ĝi estas mia parolanta horloĝo... -

- Ne kredeble, sed klarigu pli serioze!

- Nu, kedu min.. Simple aŭskultu”...

Li frapas la gongon per la apuda marteletto, kaj tuj aŭdiĝas akra voĉo de apuda apartamento:

“Ĉu vi ne frenezas? Tia bruego je la tria matene?”

Tiu virino rapidas sub pluvo, puŝante bebo-veturilon.

Najbarino alproksimiĝas, scivoleme okulumas enen . kaj mire konstatas

“- Sed.. Sed temas pri plasta bebo!

- Kompreneble! Vi tamen ne pensu, ke mi promenigas la vivantan bebon sub tiom aĉa pluvo!... ”.

•

HORIZONTALALE

1. Kapitan'.
2. Heroo de la helena mitologio. Grupo.
3. Trikest'.
4. Flankenmeti.
5. Ligna cilindroforma kuvo.
6. Aparat', kiu permesas regi la fluadon de akvo. Negaci'.
7. Konjunkcio. Muzika signo.
8. Geranio. Sufikso.
9. Litera nomo. Aĵo.

VERTIKALE

1. Regnestr' en Rusio .Variad' de la rapido.
2. Centro de kuko. Litera nomo.
3. Malbona eta ŝipo.
4. Ornamado per lumiloj.
5. Loĝantin' de Polio. Ruĝa ber'.
6. Triopa okcigen'. INVERSE: litera nomo.
7. Liberigi iun el danĝero. Prefikso.
8. Forte. Glaso' kun piedo.
9. Bleki forte. Ostet' en la buŝo.

Iu aŭtomobilisto deziras kontrakti specifan asekuron antaŭ ol feriadi en montaro, kie li neniam veturis.

“De kiom da tempo vi stiras?

- De dekkvar jaroj...

- ... Kaj ĉu vi iam spertis

akcidenton? - Hem... Hem... sed mi tamen konfesu...

- Kial vi hezitas?

- ... Fakte mi ne scias, ĉu vi taksas tion kiel akcidenton...

Du semajnoj post mia vetur-permeson, mi akceptis junulinon, kiu petveturis...

- Kaj?...

- Ŝi iĝis mia edzino!”



Solvo de la KVE de La Informilo 181

SOLVO 181:

Horizontale: 1.AKOMPANANT. 2.NIKEL. ALEO. 3. TRAGEDIIST. 4.AL. AKURATA. 5.BLT. OL. 6.OBEL. ESTRI. 7.NESTAĈ. RIS. 8.IST. KIAM. 9.STERADIAN. 10. MOGADIŜ.

Vertikale: 1.ANTAGONISM. 2.KIRL. BESTO. 3.OKA. BESTEGO. 4.MEGALIT. RA. 5.PLEKT. ANAD. 6.DU. EĈ. DI. 7.NAIRIS. KIS. 8.ALIA. TRIA. 9.NESTORIANO. 10. TOTALISM.

Amika tago en la Freiburg la 23an de junio 2018

Jam estas tradicio okazigi tiun "Amikan Tagon" en la lasta semajnfino de junio. Plej ofte ili alterne okazas en La Vogezoj, kie aktivas Ginette kaj en Freiburg, kie aktivas Ursula kaj Manfred.

Ĉi-jara invito al Amika Tago venis de la samideanoj de Freiburg. Ili proponis rendezuon en la stacidomo de Freiburg. Tio estas tre oportuna, ĉar eblas favorpreze trajnveturi ekde la staci-domoj de Müllheim aŭ de Breisach.

Tute akurate je la 11a30 troviĝis deko da samideanoj en la renkontiĝ-punkto de la stacidomo.



Manfred celis gvidi la grupon al muzeo pri stano-figuroj, tamen trankvile promenante tra la stratoj de la urbo, li survoje klarigis pri la monumentoj kaj historiaj domoj de Freiburg.

La muzeo troviĝas en la turo "Schwabentor" centre de la urbo.

Necesis ŝtupare grimpi por atingi la ĉambrojn kun diversaj dioramoj. Tie troviĝas pli ol 20 da ili, kiuj montras dramajn epizodojn pri historiaj konfliktoj en malgrandaj skalo: Eble tiel estis. Centraj temoj estas la tempo de kamparana milito en la jaroj 1524-1526 kaj la Reformacio, krome la badena revolucio de 1848. La dioramoj ilustras diversajn eventojn el tiuj militoj por memliberigoj



La vorto **dioramo** en moderna lingvouzo signifas tri-dimensian naturgrandecan aŭ miniaturan modelon de aranĝita sceno el la vivo de homoj aŭ bestoj, de natura pejzaĝo, evento el la homa historio kun multaj partoprenantaj homoj (ekzemple historia arma batalo) aŭ panoramo de historia homa loĝloko, foje enfermita en vitra montrofenestro de muzeo.

Estis interese trarigardi la etajn figurojn kaj provi kompreni per nuna pensmaniero, kia estis la tiama vivo kaj viv-problemoj. Feliĉe estis metita je dispono klarigoj en Esperanto pri ĉiu dioramo.

Iom super la urbo troviĝas la kastan-ĝardeno, kun multaj tabloj, kie eblas pikniki kaj aĉeti manĝaĵojn. Ni atingis tiun lokon piede kaj lifte.

Tie ni kunsidis por la tagmanĝo kaj povis samtempe ĝui belan panoramon al la urbo.





La bela vetero allogis al plia promenado. Jen la urba ĝardeno, kie multaj homoj povis ĝui la sunon (aŭ la ombron). Tie eblis akiri diversajn kafojn. Jen kiel aspektas simpla kafo-lakto:



En niaj konversacioj estis ankaŭ amikaj kaj simpatiaj pensoj al Simone, kiu estis konata de ĉiuj. Promene ni revenis al la stacidomo, de kie la francaj partoprenantoj povis hejmen-veturi. Ni dankis al la organizantoj pri tiu agrabla tago en eta esperantio.

Andreo

Simone Kiry †

Post refoja malsaniĝo Simone Kiry estis enhospitaligita en Mulhouse. Ŝi suferis je leŭkemio, tamen ĉi-foje ŝia koro ne eltenis la kuracadon. Ŝi forpasis la 16an de junio 2018. La samideanoj de Mulhouse-Esperanto kaj Esperanto-France-Est estis informitaj pri tiu malĝajiga evento.

En 2004 okazis en restoracio en Battenheim nia 3-landa Zamenhof-festo, tiel Simone konatiĝis kun Esperanto kaj ekde 2005 ĝin eklernis. Ŝi aliĝis al lokaj kaj regionaj asocioj kaj iĝis eĉ komitatanino.

Krome ŝi aktivis kaj subtenis la asociojn, ŝi ege ŝatis legi, inkluzive librojn en Esperanto, tial ŝi akiris multajn librojn. Pluraj el vi memoras, ke ŝi ankoraŭ partoprenis nian lastan staĝon en Rimlishof.

Ni ricevis multajn simpatiajn salutojn kaj kondolencojn, kiujn ni transdonis al la familianoj.

La 21an de junio okazis en la preĝejo de Battenheim la funebra ceremonio en ĉeesto de ŝiaj 6 gefiloj, kiuj emociie parolis pri sia patrino. Dekkvino da membroj de Mulhouse-Esperanto ankaŭ ĉeestis. Nia grupo deponis florojn sur ŝian tombon kun la surskribo:

Al nia kara samideanino
MULHOUSE-ESPERANTO

Simone estis malavara kaj planis subteni orfejon en Afriko, tial ricevitaĵoj iros al tiu celo. Dume ŝi restos en niaj koroj kaj ni pensos pri ŝi okaze de niaj Esperanto-aranĝoj.



Andreo



Nous avons la profonde tristesse de vous faire part du décès de

Madame Simone KIRY

née HECK

enlevée à notre tendre affection le 16 juin 2018, à l'âge de 65 ans.

La cérémonie religieuse sera célébrée le **jeudi 21 juin 2018, à 14 h 30, en l'église Saint-Imier de Battenheim.**

Les fleurs et les plaques pourront être remplacées par un don en faveur d'un orphelinat au Congo en lien avec l'association « **Mulhouse Espéranto** ».

CET AVIS TIENT LIEU DE FAIRE-PART ET DE REMERCIEMENTS

2018-05-01/06 Mirinda Lviv

Lviv (pole Lvov, germane Lemberg) estas partnera (ĝemela) urbo de Freiburg im Breisgau. La tradicia internacia ukraina Esperanto-renkontiĝo Aroma Jalta estis translokigita al Lviv post la akaparo de Krimeo fare de Rusio.

Ĝi okazas dum la unua semajno de Majo. Samtempe okazas la tagoj de Lviv, pro tio la urbo estas plena je homoj el multaj landoj. Bedaŭrinde ankaŭ la transportiloj (trajnoj, aviadiloj) estas plenplenaj, kaj malfacilas ricevi rezervitan lokon, kio estas deviga ankaŭ en rapidaj trajnoj; feliĉe mi trovis lokon en kuŝvagono inter Vroclavo kaj Lvivo, kio donis al mi la eblecon konatiĝi kun samideanoj en Vroclavo.



Gaja vespera kunveno



Instruado sur granda balkono

E n t u t e partoprenis ĉ. 40 homoj el Litovio,

Pollando, Ukrainio, krome po unu el Aŭstrio, Francio, Germanio. Mi klopodas teni la kontakton kun la Lviv-aj samideanoj. Virinoj – junaj kaj malpli junaj – plimultis. Plejmultaj povis loĝi en diversgrandaj ĉambroj en “nia” hoteleto “Hostel Casa Nostra” str. Stefanik no. 4, kiu situas proksime al la urbocentro kaj estas tre agrable ekipita. Du virinoj prizorgas ĝin, kaj kelkfoje unu el ili tranoktis sur la benko de la salono. Proksime troviĝas diversaj vendejetoj por aĉeti matenan kaj vesperan manĝaĵon. Por tagmeza manĝo estas pluraj bonaj (malmultekostaj por ni okcidentuloj)restoracioj, ankaŭ por vegetaranoj.

Matene ni laboris en tri bonkvalitaj kursoj: por komencantoj, paroliga kurso kaj perfektiga kurso.

Posttagmeze vizito al la tre interesa urbo, kiu montras diversajn polajn kaj aŭstrajn konstru-stilojn. Multaj belegaj preĝejoj de diversaj eklezioj. Apud la Dominikana Preĝejo mi vizitis muzeon pri religioj. La vartistino rakontis, ke okazis aparta ekspozicio pri Baha'i; mi demandis pri ili, ĉar nun mankis informo – mi rakontis al ŝi pri Esperanto (en rilato al ilia 12-a regulo). Granda foirplaco ĉirkaŭ la urbo-domo el la XIV-a jarcento kun alta turo, kiu donas rigardon super la urbocentro.



En la subĉiela muzeo

Ni migradis sur la altan monton (413m s.m.). De tie ni rigardis super la tutan grandan urbon kaj ĉirkaŭantan regionon; tie troviĝis la unua burgo kiun reĝo Danilo donacis al sia filo Leŭ, kiu donis la nomon al la estiĝanta urbo.

Aparte ni vizitis la scienca bibliotekon Stefanika, en samnoma strato, kie estas ekspozicio pri scienculoj de la Lviv-a historio; proksime troviĝas la muzeo pri “Ruzalka Dnistroj”, titolo de la unua literatura libro en la ukraina lingvo (1836). Tri teologiaj studentoj



Korto de la kastelo Zoloĉev

kolektis popolajn rakontojn (ruzalka t.e. najado, en rivero Dnestro). Ĉar dum tiu tempo estis malpermesite uzi la ukrainan lingvon, ili poste devis iri en ekzilon al Budapeŝto; oni diras, ke de tiam naskiĝis la ukraina nacio. Alia fama verkistino en la ukraina estis Lesja Ukrainka en la 20-a jc. . Finfine okazis bus-ekskurso por konatiĝi kun la regiono. Sed pro malfacilaj trajn-konektoj mi revojaĝis jam unu tagon pli frue, vizitante survoje la partneran urbon Bierun proksime de Katowice.

En la centro de la urbo estas mallarĝaj stratetoj, placetoj kun monumentoj pri historiaj homoj; plejmultaj konstruaĵoj aspektas originale. Diversgrandaj parkoj invitas trankviliĝi sub la arboj.



Ora Hufo-fero: - en korto de kastelo Zoloĉev

Krome eblas promeni en la proksima granda subĉiela muzeo, maldensa arbaro kun kolekto da ligno-konstruitaj domoj kaj kapeloj de regionaj popoloj (triboj), kie oni ankaŭ demonstras la tipajn antaŭ-industriajn metiojn.



Ornamentaj samideaninoj en subĉiela muzeo

La vesperoj estis por konatiĝi, aŭskulti kantojn – en la pola, litova kaj mem kanti modernajn kantojn en Esperanto – dank'al saĝtelefonoj la tekstoj estis rapide kopiitaj. Ne forgesinde: ni ĉiuj partoprenis teatraĵon en du mirindaj versioj: kvazaŭ fulmrapida virtuala prezentado de Cindrulino kun multaj aktoroj.

Ne eblas rakonti pri Lviv sen rememori pri la historio inter 1939-1945.

La regiono Galicio ja estis pola dum 1939. Post la milito-deklaro de Germanio kontraŭ Pollando, 1-a de Septembro, je la 17-a (?) de Septembro germanaj kaj sovetiaj soldatoj komune okupis la urbon Lvov, kaj Sovetunio invitis la civitanojn aliĝi al Ukrainio (kiel tio okazis en Krimeo 2014!).

Stalin deportigis dekmilojn da judoj kaj aliajn homojn al Siberio – fakte li savis la vivon de tiuj kiuj travivis tion. De la “Ora Rozo” la granda sinagogo, restis nur muro – tie nun situas monumento pri la kruela sorto de la judoj en tiu regiono, ĉefe pro la ekstermo far la nazioj; tamen, lokaj pogromoj okazis ankaŭ pli frue. Multaj tombej-ŝtonoj (nov-faritaj) montras rilatajn tekstojn el la literaturo.

Alian lokon mi hazarde trovis super la citadela monto: la ejo, kie nun oni stokas librojn de la scienca biblioteko. Tie troviĝis "StaLag 328", baza milit-kaptitejo de la germana armeo. De 284.000 soldatoj mortis pli ol duono pro malsato, malsanoj, torturo kaj mortpafo. Inter ili 46 italaj milit-rifuzantaj soldatoj ekzekutitaj en aŭtuno 1943.

Finfine tiu regiono estis transdonita al SU, poloj devis translokiĝi al Pollando, kiu siaflanke ricevis de Germanio la okcidentan regionon ĝis Odro kaj Niso.

Ligoj: Mirinda Lviv: www.aromajalto.ukrainio.org.ua/home, Historio: wikipedia.org

Urbodomo de Lviv kun turo (65m)



Podhirce Zamek



Ekskurso: Ora Hufo-fero - ĉe kastelo Pidgirci



Raporto de Manfred

Fotoj (krom urbodomo) de Vida Kulikauskiene, Litovio

La 70-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO



Fervojistoj festis sian jubilean 70-an kongreson de Esperanto en Pollando, en la bela urbo Vroclavo. La pola fervojista asocio kunlabore kun la membroj de la Silezia asocio kaj aliaj esperantistoj sub gvido de Teresa Pomorska pretigis riĉan programon. La aranĝon partoprenis 124 gesamideanoj el 19 landoj. La plej foraj venis el Ĉinio kaj Usono. Ĉe la enirhalo de la vroclava ĉefa stacidomo *Wrocław Główny* estis instalita alloga ekspozicio pri d-ro L. L. Zamenhof kaj pri la lingvo Esperanto. La kongresejo troviĝis en la hotelo *Piast* situanta vid-al-vide al la stacidomo. Sabate dum la interkona vespero okazis prelego pri la regiono. Ravis nin la nokta surakva lumspektaklo kaj pireteknikaĵoj ĉe multmedia fontano.



La solena inaŭguro okazis en la impona eksa kapelo *Oratorium Marianum*



de la Vroclava Universitato kun ĉeesto de ĝia rektoro s-ro Adam Jezierski. Li plezurigis nin per ludado de

orgeno malnova je 300 jaroj. Post pluraj bonvenigaj salutvortoj de la prezidantino Rodica Todor kaj aliaj reprezentantoj sekvis la legado de bondeziraj mesaĝoj, salutoj de ĉeestantoj de la partoprenantaj landoj kaj disdono de honoraj diplomoj. Post la malfermo de la kongreso okazis komuna fotado ekstere sur la placo ĉe fontano. Posttagmeze ni vizitis la urbon. Tre varia estis la Nacia vespero en kiu prezentiĝis tri folkloraj grupoj. Ili regalis nin per kantoj kaj dancoj el diversaj polaj regionoj.

Dum la semajno kunvenis la estraroj de IFEF. Krom la pridiskuto de movadaj aferoj okazis fakaj kaj aliaj prelegoj. Komencantoj havis eblon sekvi E-kurson kaj komencintoj povis progresi en la parolado. Atelieron pri "Kiel efike kunlabori kun redakcioj kaj ĵurnalistoj" gvidis la sperta ĵurnalisto Alfred Schubert. Dum lia alia sesio, partoprenantoj akiris bazajn informojn pri verkado de retpaĝoj. Hispanaj samideanoj prezentis al ni venontan kongreson, kiu okazos en Malago. Alloga estis anonco pri la tritaga postkongreso en Maroko. Surloke jam eblis aliĝi.



Admirinda estis vizito al botanika ĝardeno kun ĉiĉeronino, kiu donis al ni sciigojn pri diversaj plantoj, floroj kaj arboj. Speciala fenomeno, kiu vekas intereson de turistoj estas kelkcentimetrojn altaj bronzaj koboldoj en diversaj pozicioj. Ili invadas la tutan urbon. En Vroclavo tiutempe okazis muzikkantfestivalo de Esperanto, kiun ni povis ĉeesti. En ĝi prezentiĝis blindaj esperantistoj Kaŝi (Carsten Schnathorst el Germanio) kaj Wojciech Ławnikowicz. La ĵurion reprezentis la konata kaj ŝatata muzikisto JoMo, kiu poste ĉe la fermo de la kongreso kantis por ĉies ĝojo. Ankaŭ koncerto de Kaŝi en salono de Vroclava centra stacidomo havis grandan sukceson.



Ĉiuj ĝuis la ŝippromenon sur la rivero Odro kun vespermanĝo kaj koncerto de la ĉeĥa ensemblo "NOPROBLEM". Sekvis vespera promeno tra la



malnova kvartalo *Ostrów Tumski*. La nokto estis agrable varma kaj ĉie svarmis ridetantaj homoj. Ne mankis vizito per trajno al fervoja muzeo en *Jaworzyna Śląska*, kie ni admiris vagonaron kaj antikvajn vaporlokomotivojn ekde la jaro 1890 ĝis la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento. Veturante en vagono ni spertis turnon sur turn-platformo. Sekvis vojaĝo al urbeto *Świdnica* kaj vizito al du preĝejoj, el kiuj la kirko de la Paco estas unu el la plej grandaj kaj interesaj lignaj preĝejoj en Eŭropo.



Alia interesa ekskurso gvidis nin al la Valo de palacoj kaj ĝardenoj. Unue ni trarigardis parkon de miniaturoj en *Kowary* kaj poste ni admiris kelkajn palacojn de la regiono.



Dum la ĝisrevida vespero vroclavanoj de la Tria Aĝo ĉe la Ekonomia Universitato prezentis muzikan spektaklon kaj kelkajn hajkojn. Teresa

kunvenigis ĉiujn helpantojn kaj ni aplaŭdis ilin pro sukcese aranĝita kongreso. Mallonge gitarludis Wojciech Ławnikowicz kaj JoMo. Al hispanaj gesamideanoj estis transdonita la flago kaj la kongreso estis fermita. Sekvis tritaga postkongreso en la urbo Krakovo. La programo inkluzivis viziton al la fama salminejo *Wieliczka*, kunvenon kun lokaj esperantistoj kun riĉa bankedo,



ekskurson al la kastelo *Wawel* kaj promenon en la juda kvartalo *Kazimierz*.

Liba Gabalda



Raportas Laurent Vignaud

Trian fojon en Pollando, kaj du jarojn sinsekve en regiono, kiu iam estis parto de la germana Imperio, kongresis IFEF, Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio. En la jaro 2017, la Esperantistoj-fervojistoj kunvenis en urbo Colmar en orienta Francio, kaj en 2018 ili kongresis pli oriente, nome en urbo Vroclavo, en sudokcidenta parto de Pollando. Tie, de la 19-a ĝis la 25-a de majo 2018, 120 kongresanoj el 20 landoj partoprenis en multfaceta aranĝo, kiun sekvis postkongreso en urbo Krakovo.

Por fervojoista kongreso, al kiu multaj kutimas veni trajne, la kongresejo (en hotelo Piast) ideale situis vidalvide al la ĉefa stacidomo! Tio ankaŭ tre oportunis ĉar pluraj programeroj okazis en impona salono de la stacidomo. Alia impona dumkongresa kunvenejo estis la salono "Oratorium Marianum" en la Vroclava Universitato: en ĝi plej taŭge okazis la solena inaŭguro.

Same kiel en ĉiuj IFEF-kongresoj, la programo estis tre densa, kun alterno de seriozaj kunsidoj kaj distraj kunvenoj, fakaj programeroj kaj ne-fervoj-tamaj ekskursoj. Eĉ mankis tempo por prezento de ĉiuj fervoj-fakaj prelegoj preparitaj de kongresanoj el Ĉeĥio, Ĉinio, Germanio, Italio, Pollando.



Sed probable, unu el la aspektoj de tiu kongreso, kiun probable bone memoros la kongresanoj, temas pri la multeco de Esperanto-artistoj, lokaj kaj nelokaj, kiuj prezentis sin antaŭ la publiko. Kelkaj el ili jam estas konataj (JoMo el Francio, ensemblo "Noproblem" el Ĉeĥio), aliaj malpli aŭ tute ne (Kaŝi-Carsten Schnathorst, Wojciech Ławnikowicz, Membroj de Universitato de Tria Aĝo ĉe Ekonomia Universitato). Sen paroli pri la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kies finan koncerton de premiitoj povis ĝui grupo de IFEF-kongresanoj. Ankaŭ sen paroli pri la

kantemo de la polaj Esperantistoj, kiuj kun aŭ sen muzikiloj, ĉiumomente pretas ekkanti kaj ĝojigi la kunmomentojn.

Tamen, punkto estas nepre menciinda: temas pri la klopodoj de la organizintoj por reklami pri Esperanto al la ekstera publiko. Ne nur estis preparitaj por la kongresanoj speciala materialo (stampo, Esperanto-broŝuroj, kongres-sako ktp) sed ankaŭ ne-Esperantistoj ricevis informojn pri Esperanto, interalie per paneloj ekspoziciitaj



en la stacidoma halo kaj per Esperanto-koncerto malfermita al ekstera publiko. Do gratulindaj estas la polaj amikoj-samideanoj, kiuj pensis pri tiaj reklamadoj. Kaj fine, kutima lasta programero estis transdono de la IFEF-flago al la organizantoj de la sekvonta IFEF-kongreso en Malaga.

Laurent Vignaud



**Nia foto-paĝo:
3-landa
kongreso en
Zweibrücken
majo 2018**

